# Permakulturo en Roskilde - lunde, 29-a de junio 2026

*Ni unue aŭskultos prelegon de Michael ĉe Roskilde Festivalo (je la 12 horo), kaj poste ni ekskursos (je la 14-20 horo) al la bieno, kiu ampleksas 14 hektarojn (0,14 km²).*

Okazis ankaŭ la 14/5/2026



Imagu helan malferman arbaron kun multe da nuksoj. Ejoj kun multe da "sorĉaj" eksotikaj berarbustoj. Manĝeblaj folioj de ĉiujaraj plantoj, kiu donas riĉecon de gusto. Sovaĝaj bestoj kaj insektoj havas bonajn kondiĉojn. Multon vi povas ĝui ekz. kune kun suko de pomo kaj ĉerizo.


Situante 10 kilometroj de esperanta bazejo de RF ĝi estas plena de vivo! Ekde tri jaroj Michael, Victoria kaj idoj loĝis en la malnova bieno de 1787. Ili tranformas la kampojn - ekde porkomanĝaĵo (ordinara tritiko) al multdivereco per **Permakulturo**!

Ĝi estas dezajnfilozofio kaj praktiko, kiu emfazas la kreadon de daŭrigeblaj kaj memsubtenaj homaj sistemoj, harmoniantaj kun la naturo.

Alivorte, ĝi estas la bela intermikso inter sovaĝa naturo kaj maŝinagrikulturo. Multo de permakulturo estas antikva scio, kiu povas esti inkludita en la sekva esprimo:

"**Vi devas agi ne kontraŭ sed <u>kun</u> la naturo**"

Uzi la sinergiojn, kiujn la plantoj, fungoj, bakterioj ktp. havas inter si. Fari ŝablonojn kaj kadrojn en kiuj la manĝeblaj plantoj povas disvolviĝi, por ke estonte vi intervenus tiel, kiel eble plej malmulte.




Sed permakulturo estas pli ol flora sitemo de agrikulturo. Ĝi fakte volas ŝanĝi la socion - nek pli nek malpli! Ekz. vi povas pensi permakulture kiam vi renovigas aŭ konstruas domon. Per multe da scio vi povas trovi la plej bonan kaj taŭgan solvon aŭ direkton. Kiel vi plej saĝe povas ŝpari akvon, transporti vin aŭ interagi kun aliaj?

La etiko estas prizorgo de la tero, zorgo pri homoj kaj justa distribuado de rimedoj.




## Permakulturo havas 12 pricipojn

1: Observi kaj interagi

2: Kapti kaj stoki energion

3: Atingi kultivaĵon

4: Uzi memreguligon kaj akcepti reagojn

5: Uzi kaj valorigi renovigeblajn rimedojn kaj servojn

6: Ne produkti rubon

7: Dezajno de ŝablonoj ĝis detaloj

8: Integri anstataŭ apartigi


9: Uzi malgrandajn kaj malrapidajn solvojn

10: Uzi kaj valori diversecon

11: Uzi randojn kaj taksi la marĝenon

12: Uzi kreeme kaj respondi al ŝanĝo

## Jen mapo de la kampoj



## Kelkaj kreskaĵoj

Ni planas, ke la plej ĉefa estonta bienrikolto estu juglandoj, ordinaraj kastaneoj kaj pomoj por suko. Jen tri aliaj frugtplantoj vi observos dum la ekskurso:

Grosbero-kivio
(latine: Actinidia arguta)



Eleagnaco
(latine: Elaeagnaceae)




Triloba azimeno aŭ
paŭpaŭo
(latine: Annonaceae)



## En la reto

slaeggerupvej215@gmail.com

[cuts.top/FmFa](cuts.top/FmFa)




Unu el la utilaj iloj estas
dividi la ejon en zonoj




## Vortprovizo en la kampo

"Kiu ŝtelis miajn protekt-gantojn?"
kaj "kie estas mia akvobotelo?"




Ni uzi la

**rastron** (aŭ sarkilon) por liberigi kreskan spacon por la planitaj plantoj.

**fosilon** aŭ **ŝpaton**, por ebenigi la grundosurfacon.

**akvumilon**, por verŝi akvon al la plantoj. Bonzorgi ĝis ili mem vivsubtenas.

**rastilon** por rasti la tonditan herbon.




## Ĉu vi konas tiujn arbojn/arbuston?

En la dana:


1 Bøg, 2 Eg, 3 Rødel, 4 Elm, 5 Ask, 6 Røn, 7 Lind, 8 Fyr, 9 Ahorn, 10 Birk, 11 Asp/Poppel, 12 Hassel, 13 Fuglekirsebær, 14 Pil, 15 Hestekastanie & 16 Rødgran

En la angla:

1 Beech, 2 Oak, 3 Alnus glutinosa, 4 Elm, 5 Ash, 6 Rowan, 7 Linden, 8 Pine, 9 Maple, 10 Birch, 11 Aspen/poplar, 12 Hazel, 13 Bird cherry, 14 Willow, 15 Horse chestnut & 16 Picea abies






1
2.